

Kataluna Esperantisto



NUMERO 333 (99)
KVINA EPOKO
JANUARO-MARTO 2005

Omaĝo al fratinoj Rosell

Aranĝoj en Manresa kaj Vilanova

Kongreseto en Mataró

Ludoviko procesita

ABC-pack naŭlingva

Ĉu celo aŭ ilo?

Petr Ginz en el record

Tekstoj por lernantoj

L'esperanto a Maó

L'esperanto avui, ¿per què?

Es esperantistes d'alguna manera estem de sort: habitualment, a casa nostra, l'esperanto es veu amb una gran simpatia. Tanmateix, en parlar-ne, de seguida s'hi afegeix que és una cosa del passat i se'ns diu que un avi l'havia après o que abans de la guerra el parlava molta gent, que va ser un fracàs i que és una bella quimera, però que no podrà assolir-se mai. Bé, potser que ens ho fem mirar i analitzem si, fet i fet, anem errats. Per això, vegem com han evolucionat alguns altres moviments socials.

El moviment d'alliberament de la dona va aparèixer gairebé en la mateixa època que l'esperanto, ara fa una mica més de cent anys. Durant tot aquest temps la situació de les dones, en el nostre entorn, ha millorat considerablement, però tots sabem, i és notícia diària a la premsa, que la igualtat no s'ha aconseguit i que queda molt i molt de camí per recórrer. Personalment, em temo que no arribi a veure la plena igualtat entre homes i dones, no ja a tot el món, sinó ni tan sols aquí.

El moviment ecologista fa 30 anys se centrava sobretot en l'objectiu d'aturar la construcció de noves centrals nuclears. Aquesta batalla sembla guanyada, però s'han obert molts altres fronts, alhora que l'ecologia ha passat a tractar-se en un altre nivell, i és ja un tema essencial en l'agenda social i dels governs. Aquest major nivell de consciència ha portat a acords com els de Kyōto que, tot i les seves grans imperfeccions, simplement no s'haurien pogut somiar fa una generació. Tot i això, o precisament per aquesta major conscienciació, tots veiem que queda molt i molt de camí per recórrer, el final del qual ara mateix ningú el pot albirar.



El moviment per la pau fa 20 anys estava centrat, a casa nostra, en la lluita contra el servei militar obligatori –una altra batalla que es va guanyar. Però des de llavors ha passat també a un altre nivell, cap a la construcció i

segueix a la contraportada



**Planitaj aranĝoj
fariĝas nekredeble
pli sukcesaj
ol antaŭvidite**

**La viglon oni mezuru
ne nur laŭ la kvanto
de aktiveco, sed ankaŭ
laŭ la partopreno
de novaj homoj**

Foje agadoj disfloras sen centra sprono: tiel okazis en decembro kaj januaro en Barcelono (festo de trinkejo Badlands), Manresa kaj Vilanova i la Geltrú. Foje montriĝas ke planitaj aranĝoj fariĝas nekredeble pli sukcesaj ol antaŭvidite: tiel okazis en la marta Kapeguja Renkontiĝo en Mataró, kie la nombro de aliĝintoj kvarobligis tiun de similaj renkontiĝoj pasintjaraj. Tiaj aferoj estas esperigaj, ĉar post paso de la jubilea jaro, povus esti pli malfacile lanĉi allogajn projektojn: ili evidentigas aktivemon kaj partoprenemon.

Kaj ankaŭ la kalendaro por la venontaj monatoj estas vigla: prezento de la Jubilea libro en la Histori-Muzeo de Katalunio (17an de marto), kurseto pri esperanto-literaturo (9an de aprilo), surstrataj budoj en la libro- kaj labor-tagoj (23an de aprilo, 1an de majo), renkontiĝo en Vilafranca del Conflent (7an kaj 8an de majo). Estas planata sufiĉe amasa komuna vojaĝo al IJK, kaj denove granda renkontiĝo septembre en la ĉirkaŭaĵoj de Barcelono.

La viglon oni mezuru ne nur laŭ la kvanto de aktiveco, sed ankaŭ laŭ la partopreno de novaj homoj: ankaŭ en tio la Kapeguja Renkontiĝo estis plena sukceso. Ĝuste por faciligi la iom-post-ioman akiron de la lingvo, ni lanĉas ekde ĉi tiu numero novan rubrikon por komencantoj kaj progresantoj, redaktatan de Gerard Escuer: tiamaniere nia revuo kunigas tekstojn en la tri lingvoŝtupoj: katalulingvaj, por la ĝenerala publiko; facilaj, por la lernantoj; kaj en nesimpligita esperanto por la spertaj esperantistoj. Ankaŭ la Lagado-konkurso, prizorgata de Joan Ramon Guinó, estas interesa ebleco por plilarĝigi propran vortostokon.

Ĝuu kaj partoprenu!

Hektor Alos i Font

Naskiĝoj

Martí Llop i Ollé naskiĝis en Sabadell la 19an de januaro. Ni gratulas la gepatrojn Marina kaj Jordi. Lau Quevedo i Ricart naskiĝis en Solsona la 10an de februaro. Ni gratulas la gepatrojn Marta kaj Carles.

En ĉi tiu numero kunlaboris: Carles Verdugo, Darío Rodríguez, Ferriol Macip, Francesc Serra, Gemma Armadans, Gerard Escuer, Guillem Portell, István Ertl, Joan Ramon Guinó, Joan Inglada, Llibert Puig, Manel Vinyals, Munts Casamitjana, Pedro Martín, Ramon Perera, Raül Salinas, Sylvie Roques kaj Xavier Margais.

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785

Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie (ne) Agnoskitaj)

Peranto de: UEA (revuoj Esperanto, Kontakto kaj libroj), FEL (revuo Monato kaj libroj), IKEL (revuo Etnismo), La Kancerkliniko, La Ondo de Esperanto, Scienca Revuo, Komencanto, Juna Amiko, Internacia Pedagogia Revuo, La Gazeto, Fonto, Literatura Foiro, Heroldo. Ni peras ankaŭ aliajn revuojn.

Apartat/Poŝtkesto 1008
08200 Sabadell (Vallès Occidental), Catalunya/Katalunio
Tel. 937 109 636; Fakso: 937 163 633

Ret-adreso: kea@esperanto-ct.org
Ret-paĝo: www.esperanto-ct.org
Ret-listo: nia_listo@esperanto-ct.org

Kotizoj por la jaro 2005: Individua Abonanta Membro 36 eŭroj; Individua Subtenanta Membro 72 eŭroj; Individua Dumviva Membro 720 eŭroj; Kolektiva Membro 72 eŭroj; Juna Membro 24 eŭroj.
Banko: Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona Agència 461 Sabadell,

Kontonumero: 2100 0461 90 0200055053

IBAN: ES95 2100 0461 9002 0005 5053

Konto UEA: kea-b

CIF: G-58338567

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Josep Franquesa; sekretario: Hektor Alos i Font; kasisto: Òscar Puig; komitatoj: Arnau Massanes, Llibert Puig, Mateu Vic, Neus Moly, Ramon Perera.

Kontrola Komisiono: Christian Pinard, Luz Vázquez, Sylvie Roques.

Kataluna Esperantisto: Hektor Alos i Font; esperantlingva revizianto: Ramon Perera; katalunlingva revizianto: Guillem Portell; kompostanto: Ferriol Macip i Bonet.

La artikoloj publikigitaj en Kataluna Esperantisto ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

Kataluna Esperanto-Junularo: Apartat 32.318 - 08080 Barcelona

Impres a/Presita ĉe: Copimatge, Sant Cugat del Vallès (Vallès Occidental), Tel. 935 892 368. Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

Nokta festo

La 18an de decembro okazis nokta festo en Barcelono en Badlands, la muzika trinkejo de nia esperantista amiko Pako Belmonte. La temo de tiu nokto estis, ke muzikoj en ĉiuj lingvoj, ne nur en la angla, estas aŭskultindaj. Evidente, esperanto ludis gravan rolon dum la nokto, kaj tio permesis konigi esperantajn muzikojn al ne-esperantistoj kaj ankaŭ al novaj lernantoj de esperanto. En bonega etoso, la nokto flugis.

sr

Zamenhofa tagmanĝo

La 20an de decembro dudeko da esperantistoj renkontiĝis en la jam tradicia tagmanĝo organizita de Centro de Esperanto Sabadell ĉirkaŭ la Zamenhofa tago.



Nokta festo en Badlands

Amase en Tuluzo

Kiel ĉiun jaron, ni festis la Zamenhof-tagon en Tuluzo. Ĉeestis 74 esperantistoj, kiuj venis el diversaj partoj de la regiono kaj partoprenis la renkontiĝon homoj el Pau kaj el Nord-Katalunio (unu).

Post la tagmanĝo venis libera tempo, dum kiam la homoj povis interkonatiĝi kaj babili. Ili havis ankaŭ la eblecon rigardi, aŭdi kaj aĉeti multe da libroj kaj kompakt-diskoj en la tri starigitaj budoj. Por mi, estis granda plezuro trovi geamikojn, el kiuj kelkajn mi vidas nur dum la jara Zamenhof-festo, kaj koni novajn esperantistojn. Poste estis la momento de la teatraĵo. La ludado de "Familia etoso" pliboniĝis rilate al Ceret.

Post paŭzo, ni havis violon-koncerton de nia amiko Bogumil Włodarski kaj liaj lernantoj.

Por resti ankoraŭ iomete kune, ni finis la tagon trinkante kaj babilante. La aranĝo estis bonega kaj multaj inter ni dezirus, ke tio okazu pli ofte, kunorganizite de la diversaj tuluzaj esperanto-grupoj.

Sylvie Roques

Manresa

Kiel anoncite, okazis en Manresa sinsekvo de esperanto-aranĝoj, de decembro ĝis februaro, pro la centjariĝo de la loka esperanto-grupo, unu el la tri pioniraj klubejoj en nia lando. La tuta programo estis prezentita en fruktodona gazetara konferenco la 9an de decembro.

La 14an de decembro Llibert Puig prelegis antaŭ dudekelkaj homoj pri "ĉu plu esperanto estas utila", kadre de la ekspozicio pri la cent jaroj da esperanto-movado en Manresa. Ĝi estis vizitebla ĝis la 18a de januaro, kiam ĝi eniris la regionan historian arkivon, kiu kunlaboris en la ekspozicio per siaj materialoj.

Esperanto-kurso gvidata de Pere Palà komenciĝis la 14an de januaro kun kvin lernantoj, al kiuj ĝis nun aldoniĝis du pliaj.

Laste, la 17an de februaro estis planita libro-prezento, kiu ne okazis. Anstataŭe, tute spontane, la kunvenintoj ligis interes-plenan babiladon en ĉeesto de i.a. Conxita Tubau kaj Gabriel Mora i Arana.

fs / lp / red

Fratinoj Teresa kaj Eulàlia Rosell i Capdevila meritas apartan atenton. Teresa estis instruistino de elementa edukado kaj starigis privatan akademion helpe de ŝia fratino Eulàlia. Tre kompetenta en lingvistiko, ŝi dediĉis siajn preferojn al la studado kaj instruado de la kataluna kaj de la esperanta lingvoj. Fervorulino de nia granda poeto Manuel de Cabanyes, ŝi adoptis lian verkaron kiel literaturan lernolibron, laŭ Ramon Ferrer i Parera diris en sia libro “Poetes, versaires i rimadors vilanovins” (vilanovaj poetoj, versistoj kaj rimantoj). La loka folkloro ŝuldas al ŝi la kolekton “Dances i Cançons” (dancoj kaj kanzonoj) kiujn ŝi donacis al la arkivo de la ĥorusa societo Orfeó Català de Barcelona.

Eulàlia, tute sin identiginta kun Teresa, akompanis ŝin en ĉiuj ŝiaj sopiroj kaj estis, kiel ŝi, devota esperantistino, krom havi eĉ pli da viv-entuziasmo por la folkloro kaj la lokaj tradicioj. Kun nerakonteblo fervoro kolektis ĉiajn antikvaĵojn, librojn, dokumentojn, gravuraĵojn, “goigs” (kantikojn), ventumilojn, “auques” (vers-parajn bild-seriojn), baladajn romanojn kaj ĉiajn paperojn eĉ kuriozajn objektojn per kio igis sian hejmon, ĉe strato Major 44, angule de la avenuo Sant Josep, vera muzeo de populaj kuriozaĵoj.

La vilanova ĵurnalisto Santiago Barberà (1912-2001), en artikolo publikigita en la loka periodaĵo *Villanueva y Geltrú* en 1975, meritplene laŭdis la spiritecon de ambaŭ fratinoj, rimarkante ilian muzikan intereson –ili ĉestis ĉiujn koncertojn ekstaze aŭskultante la verkojn de la universalaj majstroj–, ili ne maltrafis eĉ unu el la prelegoj organizitaj ĉe la Ateneo. Ambaŭ konis la verkojn de la plej bonaj katalunaj aŭtoroj kaj oni ĝojis aŭdante ilin disertante pri difinitaj verkoj, el kiuj ili laŭdire preferis La Atlàntida, de Jacint Verdaguer.

Ili havis profundan amikecon al Joan Amades (esperantisto kaj folkloristo), kiun ili multe helpis en la kompilado de la datumoj de la “Costumari Català” (katalunaj moroj) kaj de la tradicioj de la lando.

La vilanova historiisto Albert Virella (1915-2000) memoras kun simpatio ilian majstrecon en la kurso pri la kataluna lingvo organizita ĉe la Ateneo far la kataluna kultura institucio Palestra, –de kies loka delegitaro ili estis membroj–, en la jaro 1932, kaj denove ilin, dum ili gvidis la lernantojn de la kurso, en la vizito al la Masia (kampodomo) de Parellada, hejmo de familio Cabanyes, kie ili vidis la ĉambron kie la poeto lasis la surteran vivon.

En 1932 Eulàlia estis prezidantino de la grupo “Cívica femenina (Cristianisme i catalanisme)” [virina civito (kristanismo kaj katalunismo)] lokita ĉe Círcol Catòlic.

Jen tre resumita kronologio de la esperanta aktivado de la fratinoj Rosell:

En 1909 Teresa Rosell estis nomumita sekretario de la komitato de la esperantista grupo de Vilanova “Laboro Esperanta”.

En 1910 Barcelona eldonisto, B. Baxarias, eldonis, en la kolekto “De tots colors” (Bunte), la verkon “Un retrat” (portreto), kataluna traduko de la dramo, “Portreto” verkita originale en Esperanto de Nadina Kolovrat. Tradukis Eulàlia Rosell. “Un retrat” estas la unua kataluna traduko de esperantista verko.

En 1910 Teresa Rosell instruis kursojn de esperanto kaj de kataluna gramatiko en la sidejo de Laboro Esperanta

En 1914 ili partoprenis internacian esperantan kongreson en Parizo; tie la deklaro de la Unua Mondmilito trafis ilin.

La 16an, 17an kaj 18an de oktobro 1915 okazis la 6a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio. Teresa kaj Eulàlia Rosell estis membroj de la organiza komitato.

Laboro Esperanta funkciis pli-malpli regule ĝis 1930. Òscar Martí, plurfaka vilanovano, ĉefe muzikisto, naskita en 1916, estis lernanto de fratinoj Rosell kaj kasisto de la esperanta fako de la vilanova Ateneo ĝis 1937 kiam li estis konskripciita al la milito. Oni povas supozi ke esperanto instruado daŭrigis ĉar la Ateneo funkciis ĝis la 21a de januaro 1939, kiam la faŝistoj eniris en Vilanova kaj ankaŭ en la Ateneon, laŭ verkisto Xavier Garcia (1919-1998). La esperanta aktivado ne reaperas ĝis 1963, kiam la piullerneja pastro Josep Maria Claramunt organizis kurson ĉe la vilanova Piula Lernejo.

Afiktitaj de la misfortunoj, kiujn ili devis suferi dum kaj post la Hispana Milito, en decembro 1952 ilia loĝejo, ĉe la strato Major 44, estis aŭkciita kun ĉiuj mebloj, fatrasoj kaj objektoj. Ambaŭ fratinoj pasigis la finajn jarojn de la vivo en Casa d’Empara (azilejo) en treega malfirma situacio. Eulàlia i Teresa mortis en Vilanova en la jaroj 1953, respektive 1954. Kaj kun ili mortis la majstreco de esperanto (laŭ vortoj de Albert Virella).

Joan Inglada

Omaĝo al fratinoj Rosell

La 15an de decembro oni omaĝis en Vilanova i la Geltrú fratinojn Rosell, instruistinoj kaj multflankaj kulturaj aktivistoj dum la periodo de la 20a jarcento antaŭa al la faŝisma ribelo. Naskitaj en la 70aj jaroj de la 19a jarcento, ili partoprenis la esperanto-movadon de ĝia ekesto ĝis la milito. Ili gajnis i.a. premion en la Internaciaj Floraj Ludoj. Estis eldonita broŝuro pri ili, en kiu oni prezentas en apartaĵo ilian esperanto-aktivadon, kaj ĉi tiu estis reliefigita en la prezenta artikolo de la aranĝo en *Diari de Vilanova* de la 10a de decembro, sed bedaŭrinde dum la publika omaĝo tiu flanko estis neglektita.

ji / red



Joan Inglada (dekstre) prelegas en la biblioteko de Vilanova

Vilanova i la Geltrú

La biblioteko Joan Oliva de Vilanova i la Geltrú, situanta en la ĉefplaco de la urbo, gastigis esperanton dum la tuta januaro per ekspozicio kun la titolo “Esperanto: libroj kaj muziko”. La ekspozicio kombinis afiŝojn de kursoj kaj kongresoj, distribuitajn tra la tuta ĉefĉambro, kaj vitrinojn, kie oni montris librojn, revuojn kaj diskojn en esperanto.

Sabaton la 15an, matene, en la biblioteko, semo estis semita al dudeko da infanoj akompanataj de la gepatroj, kiuj ĉeestis la rakontadon de Ezopa fabelo *La leono kaj la muso* aranĝitan de Joan Inglada kaj Joachim Bohemeke. Unue ili rakontetis, kio estas esperanto, katalune, poste iom surscenigis la fabelon, en esperanto, kaj fine faris demandojn por konstati la komprenadon.

Ferme, vendredon la 21an, malvolviĝis, antaŭ dudeko da ĉeestantoj, triopa prelegaro de Hektor Alos, pri esperanto nuntempe, Francesc Poblet, pri la komenca esperanto-movado en Katalunio, kaj Joan Inglada pri la historio de la esperanto-movado en Vilanova.

La biblioteko aĉetis kolekton da libroj pri kaj en esperanto, kaj konsideras la eblecon specialiĝi en tiu fako.

Biblioteke

La dulingva libro *Els inicis del moviment esperantista a Catalunya / La komenca*

esperanto-movado en Katalunio, prezentita en nia pasinta kongreso, estis donacita al 50 bibliotekoj de la Kataluna Landaro. Per tio nia asocio klopodas ŝtopi la mankon de nacilingvaj libroj pri esperanto en niaj bibliotekoj.

Lerneje en Sabadell kaj Mataró

La pasintan 17an de decembro Llibert Puig prezentis esperanton al 25 infanoj 10-jaraj en la lernejo “Joanot Alisanda” laŭ invito de ties instruistino Munts Casamitjana.



La 10an de februaro, Xavier Rodon prezentis esperanton dum unu horo en la lernejo “Camí del Mig” de Mataró, kie li laboras, antaŭ la 56 lernantoj de la sesa klaso (12-jaraj infanoj). La aranĝo ricevis absolute gapigan sukceson, kaj oni petis duan prezenton kaj eĉ ke li ekinstruu ĝin.

lp / ga / red

Vendredaj renkontiĝoj en Sabadell

La 25an de februaro komenciĝis la “monataj vendredaj renkontiĝoj de Centro de Esperanto Sabadell”. Ili ekzistas por praktiki la lingvon, ĉiam en la lasta vendredo de ĉiu monato, ekde la 7a vespere. Oni ĉiam invitos gaston, en- aŭ eksterlandan, kiu povos paroli pri temo, pri kiu li fakas.

ces / red

Asembleo

La jara asembleo tre glate okazis la 26an de februaro kun la partopreno de 16 homoj. Prezidanto Josep Franquesa estis reelektita por dua tri-jara mandato. Kasiston Llibert Puig, post du mandatoj, anstataŭis Òscar Puig; li fariĝis komitatano, same kiel Arnau Massanes, reelektita por dua mandato, kaj Ramon Perera kaj Neus Moly, nove elektitaj. En la kontrola komisiono, Sylvie Roques anstataŭas Òscar Puig.

Post la ordinara asembleo venis eksterordinara asembleo, kie, pro proceduraj

problemoj, oni ratifis la statut-ŝanĝojn akceptitajn antaŭ du jaroj, kaj profitis la okazon por plidifini la asociajn celojn.

Kapeguja kongreseto

La sezona renkontiĝo en Mataró neatendite fariĝis preskaŭ dua kataluna kongreso, kvar monatojn post tiu en Ceret. Pli ol 70 homoj, kun larĝa plimulto de junuloj, partoprenis la renkontiĝon, al kiu aliĝis dekelko da eksterlandanoj, ĉefe iberoj, kaj preskaŭ 20 lernantoj.

La ĉefa tago de la renkontiĝo estis sabato, kun preskaŭ 30 programeroj. Ekzistis ĉiam tri samtempaj aranĝoj: por komencantoj, por progresantoj kaj por fluaj parolantoj. Por la unuaj estis aranĝitaj kursoj kaj prelegoj en la kataluna; por la duaj, prezentoj en esperanto, debatoj kaj malfermaj horoj, kie spertuloj solvis dubojn (lingvajn aŭ esperanto-rilatajn); fine por la triaj okazis diversaj prelegoj, kaj fine babilado kun la verkistoj Manuel de Seabra kaj Vimala Devi. Paralele estis elsenditaj filmoj en aŭ pri esperanto.

Larenkontiĝo utilis ankaŭ por movadala laboro: okazis KEJ-kunveno, kaj ankaŭ liberecanoj havis apartan kunsidon; KEA kaj membroj de CNT diskutis kiel estonte kunlabori; kaj vigla kunveno de iberiaj esperanto-aktivuloj skizis komunajn agadojn.

Gazetoj

Daŭris la brila rikolto de artikoloj en nia gazetaro. Elstaras la kvar-paĝa prezento de esperanto en *Presència*, la 7an de januaro, kiu prezentas unu el la plej favoraj bildoj pri esperanto iam aperintaj ĉe ni: ekz. ĝi asertas, ke “la esperantistoj de la 21a jarcento estas homoj insulte junaj, penetritaj de entuziasma aktivismo, kiu iĝas la movadon iaspeca lingva NRO”. Inter la informoj kvar intervjuoj estas aparte reliefigitaj: al Joan Català, Christian Pinard, Gerard Escuer kaj Llibert Puig; krome, ankaŭ Kaj Tiel Plu meritas memstaran skatolon. Kaj Tiel Plu generis la duan plej gravan artikolon de la trimestro: tri kvaronoj de paĝo en *La Vanguardia* de la 19a de januaro. Ankaŭ *Lletres*, kunlaborinta kun nia pasinta kongreso en Ceret, aperigis tut-paĝan artikolon en sia decembra-janua numero pri la libro de Francesc Poblet *La komenca*



esperanto-movado en Katalunio. La 15an de januaro ankaŭ *Diari de Sabadell* aperigis tut-paĝan artikolon pri la loka esperanto-centro en sia serio “Radiografio de la asocioj”.

Aliflanke, ankaŭ la diversaj lokaj agadoj vekis intereson de la regiona gazetaro: *Regió 7*, de la 10a de decembro, informis en preskaŭ tut-paĝa artikolo pri la eventoj planitaj en Manresa; en aparta kolumno oni citis vortojn de Gabriel Mora i Arana kaj Llibert Puig el la gazetara konferenco de la antaŭa tago. Ankaŭ *City TV*, iom post iom tutlandiĝanta televido kun konsiderinda spektantaro, en la sama 10a de decembro, informis dum kvar minutoj pri esperanto kaj pri la programo en Manresa. Siavice *Diari de Vilanova* informis trion-paĝe la 7an de januaro pri la aranĝoj okazontaj en la loka biblioteko, kaj pli mallonge la 21an, pri la ferma triopa prelegaro.

Radioelsendejo *RAC 1* intervjuis lundon la 3an de januaro, je la 17a kaj duono dum duonhoru, Manel Vinyals, Ferriol Macip kaj Hu Xu (ĉina esperantisto gastigata de Vinyals, kunlaboranta en la ĉina filio de ABC-Pack). La intervjuo estis vigla kaj interesa, kaj dum ĝi eblis aŭdi esperanton, ĉar la demandoj al la ĉina esperantisto kaj liaj respondoj estis tradukitaj al kaj el esperanto.

En la fako por legant-leteroj, menciidas tiu de Joan Inglada aperinta en *Diari de Vilanova* la 31an de decembro kun la signifoplena titolo “Dominar les llengües que ens dominen”. Eugeni-Lluís Batalla en *El Punt* de la 2a de januaro pledis por esperanto kiel oficiala lingvo de Eŭropa Unio, apud la angla, la franca kaj la germana, por ŝpari traduk-kostojn. En simila fako, Hektor Alos, kiel KEA-sekretario, mallonge respondas al demando de leganto pri la nuntempa stato de la esperanto-movado, en *El Periódico* de la 24a de januaro.

Mencioj al esperanto estas pluraj, el kiuj rimarkindas la substreko pri la esperantisteco de fratinoj Rosell, aperinta en *Diari de Vilanova* de la 10a de januaro; la mencio pri la traduko de la romano *Solitud* al esperanto, okaze de la centjariĝo de la verko (*Vilaweb*, 31an de decembro); kaj la kursoj de la kataluna kaj esperanto dum la diktaturo fare de anarkiistoj en la ekskurs-centro Puig Castellar, de Santa Coloma de Gramenet (*El Punt*, 25an de januaro).



Lluís de Yzaguirre procesita

Profesoro Lluís de Yzaguirre, estro de la Esplorfako pri Lingvistika Inĝenierio de la universitato Pompeu Fabra kaj membro de KEA kaj Espero, estas akuzita pri agresoj al gardisto. Yzaguirre eliris el la stacidomo de Badalona tra nepermesata loko. Gardisto haltigis lin kaj petis lian identigilon. Kiam Yzaguirre petis alparoli lin katalune, laŭ lia versio, la gardisto ŝanĝis sian sintenon kaj post mallonga interparolo mankatenis lin. Polico lin liberigis. Laŭ la surpriziga versio de la gardisto, Yzaguirre agesis lin kaj lin vundis ĉe kuro. La gardisto lin denunciis, post kio Yzaguirre same agis, sed preskaŭ du monatoj post la okazaĵoj, neniu jura kuracisto esploris la vundojn ĉe Yzaguirre, kaj la laŭdire rapida proceso jam dufoje prokrastiĝis.

Intervuoj en La Ondo kaj Pola Radio

Hektor Alos estis intervjuita en la tria paĝo de la decembra numero de la *Ondo de Esperanto*. La titolo estas “La mondo estas tia, kia oni volas ĝin vidi”, kaj en ĝi la sekretario de nia asocio respondas ĉefe demandojn pri la lasta kataluna kongreso, pri la uzado de la kataluna en niaj kongresoj kaj la neŝtatisma mondpercepto de KEA, kiu foje ŝokas alilandanojn.

Aliflanke intervjuo al Abel Montagut, registrita dum la Eŭropa Kongreso, somere en Eŭskio, estis elsendita la 4an de februaro

ĉe Pola Radio. Montagut respondis al demandoj pri sia lasta romano, *La enigmo de l'@raneo*, pri sia verkaro, pri la esperanto-literaturo ĝenerale kaj pri sia prelego en la lasta Linguapax-kongreso.

Ĉefa artikolo en Kontakto

Ricard Guasch Montaner, intervjuita en la pasinta aprila-junia numero de *Kataluna Esperantisto*, publikigis artikolon pri Salvador Dalí en la novembra-decembra numero de *Kontakto*. La artikolo, titolita “Salvador Dalí: la plej ekstrasvanca geniulo centjariĝis”, meritis la centrajn paĝojn de la revuo.

Samnumere, Roger Grilo kaj Hektor Alos mallonge klarigas pri brazilaj, respektive katalunaj, nov-jaraj tradicioj.

Joan-Pere Sunyer en Ràdio Arrels

Joan-Pere Sunyer, membro de la esperanto-grupo en Prada de Conflent, ekvidis mikroprogramon pri poezio en la nord-kataluna Ràdio Arrels. Ĝi okazas de lundo ĝis vendredo, pli-malpli je la 17a horo 55 minutoj, kaj longas 3 minutojn. La elsendoj de Ràdio Arrels estas aŭskulteblaj ankaŭ rete ĉe www.arrels.net

Novaj libroj

La dua poemaro Joan-Pere Sunyer, *Instantis*, estis eldonita fine de 2004 de la ĝirona eldonejo CCG Edicions. Pli frue li aperigis la mallongan poemlibron *Auca de l'arbre*.

Aliflanke, Manuel de Seabra eldonis ĉe El Cep i la Nansa sian novelaron-romanon *Odieu-vos els uns al altres*, aperinta en la portugala antaŭ du jaroj, kaj kies esperanta eldono espereble ne longe postrestos. Temas pri kolekto de rakontoj rilataj al la vivo de la aŭtoro en formo de po unu ĉapitro por jaro, ekde 1932, lia naskiĝjaro. La libro tuj kaptas la atenton de la leganto kaj prezentas interesan bildon de Portugalio. Ĝia prezento, la 10an de februaro en Ateneu Barcelonès, kolektis plurdekon da homoj, i.a. diversajn verkistojn, kaj fariĝis preskaŭ esperanto-arango pro la multaj aludoj al la rilatoj inter

esperanto kaj Seabra (kiu i.a. konatiĝis kun la kataluna danke al la *Kataluna Antologio* kaj al Delfi Dalmau).

Jordi Solé i Camardons publikigis novan socilingvistikan eseon titolitan *Les set tribus de la nació catalana* ĉe Documenta Balear. En ĝi la aŭtoro studas la katalunisman rezonadon pri la lingvo aperinta en la gazetaro inter la jaroj 1977 kaj 2003. Por esperantistoj, elstarindas la rekuperado kaj analizo de la proponoj de Delfi Dalmau, la granda ideologo de la kataluna esperantomovado, al kiu li dediĉis sian magistran tezon, publikigitan en 1998 ĉe Pagès sub la titolo *Poliglotesme i raó. El discurs ecodiomàtic de Delfi Dalmau*.

Joan-Pere Sunyer: *Instantis*. CCG Edicions, Col. “Terra de Pas”. Girona, 2004. ISBN 84-95483-95-5. 100 p.

Manuel de Seabra: *Odieu-vos els uns als altres*. El cep i la nansa. Vilanova i la Geltrú, 2004. ISBN 84-85960-98-X. 280 p.

Jordi Solé Camardons: *Les set tribus de la nació catalana*. Edicions Documenta Balear, Palma, 2004. ISBN 84-96376-19-2. 368 p.

“Con el esperanto en la mochila”, libro de la semajno

La 7an de decembro la ret-gazeto *La Semana.es* elektis la libron *Con el esperanto en la mochila. La vuelta la mundo en 79 días* kiel “la libron de la semajno”. Temas pri la hispana traduko de la mondvojaĝa libro de Manel Vinyals kaj Joaquim Marcoval, aperinta ankaŭ en la kataluna kaj en esperanto.

Okcitanika diktaĵo

Kvar esperantistoj partoprenis ĉi-jare en la diktaĵo en la okcitanika lingvo, organizita de la Okcitan-Kataluna Fratiga Rondo. Temas pri nova tradicio, origine franca, kie partoprenantoj konkuras pri siaj ortografiaj konoj. Ne por la unua fojo esperantistoj partoprenas ĝin: antaŭ du jaroj Lluís Garcia kaj Ferriol Macip sukcesis venki.



Ĉinaj futbalistoj

Tri knaboj de la sport-lernejo de Hubei (Ĉinio), Hu Nan, Cai Wei kaj Huang He, fariĝis ekde Novjaro anoj de Club Sportiu Tortosa. Temas pri tri promesplenaj dekkvin-jaruloj, kiuj daŭrigas sian lernadon nialande, dum ili vespere trejnas sin kiel ontaj futbalistoj.

La kontaktoj por venigi la knabojn okazis danke al esperanto-rilatoj starigitaj dum la mondvojaĝo de Manel Vinyals, kiu nun peris tiun eblecon.



Manel Vinyals, lanĉinto de ABC-Pack

ABC-Pack jam naŭ-lingva

La internacia portalo pri pakado kaj enujigo uzanta esperanton fariĝis jam naŭ-lingva. Post la komencaj hispana kaj esperanto, alvenis la kataluna, la angla, la portugala, la franca, la germana, la ĉina kaj, laste ĝis nun, la rumana. Laŭ siaj informoj, post unu-jara funkciado la portalo atingis jam 3000 registritajn uzulojn, 30 000 monatajn vizitojn kaj 1600 ofert-petojn. Ĝi iom post iom traboras sian vojon en siafaka merkato, ĉefe en Hispanio, kvankam ankaŭ la kresko de la vizitoj en la germana estas atentinda.

La portalo proponas fakajn novaĵojn kaj senpagajn informojn pri produktoj en la pakada kaj enujiga fako. Ĝi proponas ankaŭ respondi al duboj aŭ al petoj pri pliprecizigo fare de uzantoj, kiuj povas ankaŭ rekte mendi ofertojn de prezentitaj varoj.

Dum la jaro 2004 ok-homa skipo, organizita de nia asocio, partoprenis en la tradukoj al esperanto. Ili evoluigis tutan fakan terminaron, kia ĝis nun preskaŭ ne ekzistis en la internacia lingvo.

Ĉu celo aŭ ilo?

Kiel lingvo internacia povas esti celo? Ĉu lingvo povas helpi nin atingi celon? Ĉu oni lernas esperanton por paroli esperanton? Kiel vere oni lernas la internacian?

Al ĉiuj ĉi demandoj, mi modeste klopodos trovi taŭgan respondon. Sed necesas diri, unue, ke tiuj taŭgaj respondoj rilatos nur al mia opinio. Se vi havas malsaman opinionon rilate al la valoroj de la internacia lingvo, mi petas vin nur pripensi miajn vortojn.

Kiam mi eklernis esperanton, jam antaŭ iom da tempo, mi interesiĝis pri tiu lingvo. Sed oni devas scii, ke mi, fakte, ne interesiĝis pri esperanto mem, sed pri la ideo kompreni ĉiujn homojn loĝantajn en nia mondo. Do, miakaze, esperanto ebligis min kompreni, kaj pro tio mi eklernis poste.

Videblas, ke mia celo estas la komprenado anstataŭ la maniero kompreni. Kaj eĉ oni povas pensi, ke ankaŭ la komprenado estas ilo, kiu ebligas pacan kunvivadon. Ankaŭ, kaj eble pli taŭge, internacia lingvo helpas nin, pli bone organizi la tutmondan interklasan batalon, kiu donos al ni socialan kaj ekonomian liberon. Nuntempe milito kontraŭ kapitalismo povas okazi nur en internacia skalo, sed ni lasu tion.

Kiam mi rimarkis la gravecon interkompreniĝi por pli bone organizi la interklasan batalon, kaj por poste vivi harmonie, tiam mi serĉis la plej bonan ilon por tiu afero. Mi legis pri esperanto, kaj vidis, ke ĝi ja estas bona, ĉar ĝi estas facila, neŭtrala kaj jam parolata de multaj homoj el diversaj landoj.

Nun mi pensas, ke multaj geesperantistoj kredas, ke esperanto estas sia celo mem, kvankam certe ne estas tiel. Mi volus pripensigi ilin. Ĉu via celo estas disvastigi esperanton, por ke ĉiuj parolu esperanton? Ankaŭ mi, sed pensu, ke eble ankaŭ vi pensas, ke ĉiuj devas paroli esperanton por kompreni unu la alian.

Fine, mi konkludas, ke esperanto estas ilo. Vi elektas la celon!

Karlo Verdulo



De ĉambro al ĉambro

Hotel Desperado estas la lasta disko, kiun liveras Esperanto Desperado. Por multaj legantoj ne necesas prezenti la ensemblon ĉar ĝi estas tre populara pro multaj koncertoj en esperanto-kongresoj. Ĉiuokaze ili estas kvinopo el Danio, Pollando kaj Bosnio. La bando fondiĝis en 1993 kun Helle, Kim kaj Amir, kun la nomo Brokantaĵo.

Ĉi nova disko enhavas 12 kantojn verkitajn de la membroj de la ensemblo. Amo estas temo kiu aperas diversmaniere en pluraj kantoj, kiuj eble estas la plej sukcesaj de la repertuaro. En “Ĉi nokte” estas vira voĉo ploranta pri la malatento kaj foresto de sia amatino, kaj sopiranta posedi ŝin. La kanton enkondukas mallonga dialogo inter viro kaj virino disiĝantaj ĉe hoteldancejo. Sed pli ĝoja estas alia peco, “Dancu”, en kiu la ĉarma voĉo de Helle Eble Cleary rakontas la feliĉan renkontiĝon de viro kaj virino en dancejo. Kun ciganaj trajtoj, “Fatalin” estas tre pesimisma kvankam belega kria kantado pri la malgajo kaj amsuferoj de viro priploranta sian senesperan tristecon pro perdo de la kunulino, kaj timo ke ŝi eble amas alian. La tekston verkis Amir Hadziahmetović surbaze de tradicia popolkanto.

La ensemblo Kaj Tiel Plu kaj la teamo de Vinilkosmo, fininte la registradon de Plaĉas al mi.

Ankaŭ aliaj kantoj estas ege rimarkindaj. Min tre agrable surprizis la bonhumora



kaj ĝuiga ska-ritmo de “Ĉu vi pretas?”, kiu alloge priantas la ĝojon de la festo kaj invitas al dancado. Meze de la repertuaro elstaras la senteksta “Hotel Desperado”, kies orekkaresaj melodioj kunfandiĝas kaj fluas harmonie. Ankaŭ estas civilaj kantoj kiel omaĝo al forpasinta esperantistino Marie Schröder, kaj deklaro pri pacamo en “Mi malbenas militon”.

La stiloj de la KD estas tre diversaj, ĉiu kanto prezentas malsamajn vivbildojn kun propraj voĉo kaj aŭtoro de teksto kaj muziko. Ege pliriĉigas la rezulton de la disko la partopreno de pluraj gastaj muzikistoj en diversaj kanzonoj, inter ili la famaj Martin Wiese (de Persone) kaj JoMo (de JoMo kaj Liberecanoj), kiuj aldonas belajn nuancojn al la muziko. Oni situas la grupon en bona loko de la esperanto-muzika furor-listo, kaj kun tiu disko plu tenas firme altan nivelon.

Guillem Portell

Altkvalita popolmuziko

Ludi tradician muzikon ne estas facila tasko por esperanta ensemblo, tamen Kaj Tiel Plu estas pli ambicia ĉar ili frontas eĉ mezepokan muzikon. Certe, ilia sukceso sendube ankaŭ ŝuldiĝas al la ĝusta traduko de la originalaĵoj fare de S. Gumà, A. Montagut kaj J. Virgili, sed la muzika adapto montras la elstaran kreskon, kiun la trupo spertis de *Sojle de la klara temp'*. Tio montras al ni, ke la elektitan vojon ili trafis

La etoso ŝprucigita de la KD translokigas nin en lokojn kaj epokojn eble revitajn de kelkaj legantoj, kie la kataluna, la okcitana kaj la sefarda popolaj kulturoj altkvalite interplektiĝas. Aldone, la bando inkluzivas adaptaĵojn de la solisto Ramon Muntaner, de la okcitana ensemblo Nadau kaj kanton de la hispana civila milito.

Ĉion ĉi, la KTP-anoj faris danke al siaj tre buntaj instrumentoj, kiuj revivigas tiujn kanzonojn bonstile, aktuale kaj kortuŝe. Definitive *Plaĉas al mi* estas bona ilo por frandi el kia ajna parto de ĉi tiu mondo la esencon de popolo kaj de koro.

Gerard Escuer

Etnismo a Catalunya

La revista *Etnismo*, un butlletí informatiu en esperanto sobre problemes ètnics, ha publicat el seu últim número, el 75è de la seva col·lecció. En les seves 24 pàgines cobreix una gran varietat de casos, com els inuit, els herreros de Namíbia, els afrikaner i llengües d' Austràlia, Sibèria, Carib, Argentina, Còrsega, Suïssa, Euskadi, Occitània, Tatària i la Polinèsia Francesa. En un article tracta l'estatus del català a la Unió Europea i en una llarga entrevista es dona veu a un activista romanx d'origen nord-català.

Es tracta del segon número redactat per la romanda Nicole Margot i imprès i distribuït a Catalunya, amb la col·laboració de l'Associació Catalana d'Esperanto.

Justícia i Pau posa en marxa un centre d'informació sobre el poble kurd

L'organització Justícia i Pau ha engegat el Centre d'Informació i Recerca sobre el poble Kurd (CIRK), amb l'objectiu d'oferir informació alternativa i una visió especialitzada sobre la "qüestió kurda" a mitjans de comunicació, partits polítics, institucions, associacions i tothom que hi estigui interessat. El centre, coordinat pel periodista Jordi Tejel, fa un seguiment de l'actualitat d'aquesta comunitat a les diferents regions on viu: Irac, Iran, Turquia i Síria, i també preten sensibilitzar sobre els problemes que té aquesta comunitat. El centre compta amb una web des d'on es pot accedir a l'actualitat informativa i a un servei de documentació. També es farà una tasca divulgativa a través de seminaris i xerrades.

El poble kurd ha estat discriminat al llarg de la història pels diferents estats on han viscut. Turquia, un cop va haver eliminat els armenis, va proposar-se el mateix amb els kurds. A partir de 1924 el govern turc va prohibir tot

allò que tingués a veure amb la cultura d'aquest poble, inclosa la llengua, i va enviar intel·lectuals i opositors kurds a la presó, entre els quals Leyla Zana. Encara ara aquest poble viu discriminat a Turquia. A l'Irac, Saddam Hussein va portar a terme una política d'extermini del poble kurd, per a la qual es va valdre d'armament químic.

Vilaweb

Desenvolupen un traductor automàtic a Internet per a les quatre llengües oficials de l'Estat

Un grup d'empreses i d'universitats de Galícia, Euskadi, Catalunya i el País Valencià treballa en un programa de traducció automàtica entre gallec, català, èuscar i espanyol. Amb codi obert, el traductor estarà disponible a Internet el 2006 i es podrà fer servir de franc per a tots els usos no comercials.

El nou programa permetrà per primera vegada traduccions automàtiques entre les quatre llengües oficials de l'Estat. Serà el primer d'aquesta mena perquè actualment només existeixen traductors a l'espanyol, com és el cas de Internostrum (català-espanyol i a l'inrevés). Es podran traduir textos, per exemple, del gallec al català però la "llengua pivot" serà l'espanyol.

Els creadors del programa opinen que aquesta eina podria ampliar les possibilitats de comunicació entre els parlants de les llengües minoritzades. "Qualsevol traducció automàtica és imperfecta i requereix la revisió d'una persona, però amb aquest programa es fa molta via, la qual cosa redueix els costos" informa José Ramón Pichel, director del programa per part d'Imaxin Software.

Si tot va segons les previsions, el programa estarà enllestit a finals d'any i podrà ser consultat a Internet al començament de 2006. Gràcies al seu codi obert, qualsevol persona

interessada podrà millorar el seu funcionament i prestacions.

EuroLang

Problemes de traducció desbaraten un projecte de reconciliació germano-polonès.

